
## Komparu!

La ruĝa libro estas malgranda.
La verda libro estas granda.
Ankaŭ la blua libro estas granda.



La **blua** libro estas **PLI** granda **OL** la **verda** libro.

(La) ...............-O estas (**MAL**) **PLI** ...........-A **OL** (la) .....................-O.

***Ekzemplofrazoj:***

Elefanto estas **pli granda ol** muso. Mia frato estas **pli forta ol** Johano.
Esperanto estas **pli facila ol** la germana aŭ la angla lingvo.
Mi estas **pli diligenta ol** vi. Vi estas **malpli** diligentaj ol mi.
Februaro estas **malpli longa** ol januaro.

*Laŭtlegu kaj kompletigu la tabelon. (Atentu pri la ĝusta eldiro de la datoj!)*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Johano naskiĝis: | 12. 09. 1983. | Li estas ...... jara. | / Li havas ......... jarojn. |
| Maria naskiĝis: | 16. 05. 1953. | Ŝi estas ....... jara. | / Ŝi havas ......... jarojn. |
| Julia naskiĝis: | 13. 02. 1937. | Ŝi estas ....... jara. | / Ŝi havas ......... jarojn. |
| Bence naskiĝis: | 01.10. 1981. | Li estas ....... jara. | / Li havas ......... jarojn. |
| Petra naskiĝis: | 25.07.1985. | Ŝi estas ....... jara. | / Ŝi havas ......... jarojn. |
| Paolo naskiĝis: | 23.11. 1934. | Li estas ....... jara. | / Li havas ......... jarojn. |

Bence estas juna. Ankaŭ Johano estas juna.
Johano estas ........................... Bence. Bence estas .............................. Johano.
Ankaŭ Petra estas juna. Ŝi estas pli juna ol Johano kaj Bece.
Maria estas aĝa. Ankaŭ Julia kaj Paolo estas aĝaj.

Petra estas **la plej** juna. Ŝi estas **la plej** juna **el inter** la listigitaj personoj.

(La) ................-o estas **la plej** ......-a en / el inter la ............-o(j).

Ŝi estas la plej juna **en** la familio.
Kiu estas la plej aĝa el inter ili? Kiu estas la plej maljuna en la familio?
Kiu estas la plej juna el inter la ses personoj? Kiu estas malpli aĝa ol Paolo?
Kiu estas malpli juna ol Bence?